

# La Merkato

la Laŭokaza Novaĵletero de la

Internacia

Komerca kaj

Ekonomia

Fakgrupo

n-ro 29

Januaro 1990

---

IKEF \* 1984

---

## Broŝuroj de IKEF

La *Identecŝildaro* listigas la profesiajn detalojn de 36 IKEF-anoj. Prezo: 100 belgaj frankoj (inkluzive de sendkostoj). Mendu ĉe Roland Rotsaert.

La *Komerca Terminaro, proveldono*, tre rekomendinda, konigas la ĝisnunajn rezultojn al pli larĝa publiko. Tio ĉirkaŭ 85-paĝa broŝuro (formato A4) kun proksimume 1500 terminoj, ordigitaj laŭ la angla lingvo, kun tradukoj al la germana, hispana, franca, itala kaj Esperanta lingvoj kostas 450 belgajn frankojn (plus sendkostojn: 50 frankoj en Eŭropo, 100 frankoj ekster Eŭropo). Mendu ĉe Roland Rotsaert aŭ ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via libroservo.

## Konkurso:

"Juna Ekonomia Cambro" (internacie konata sub la nomo "Jaycees") de Oostende, Belgio, organizos diversajn aranĝojn en la printempo de 1990. La firmac Witdoeckt [ŭitukt] (IKEF 78) ŝatus profiti de tio por atentigi pri la internaciaj (precipe komercaj) kontaktoj, kiuj eblas per Esperanto. Sendu vian salutmesaĝon (poŝtkarton) al: WITDOECKT N. V., Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende, Belgio. La sendaĵoj jam alvenu komence de marto.

Personoj, kiuj povas disponigi interesan kolekton de internacia E-korespondado, skribu al la sama adreso (s-ino Flory Witdoeckt). /RR

## Enhavo:

Estrararo, sidejoj, kotizoj, kontoj kaj perantoj	2
Saluton	dk 3
Sinprezento de la estrarano Roland Rotsaert	4
La IKEF-biblioteko bezonas librojn	Wiersch 5
LA SEKCIO TERMINARA INFORMAS	Wiersch 6
Bonvenon; Transloĝiginto; Donacitaj libroj; Fondiĝo de Yema; Reklamtarifoj	12

---



La Merkato estas organo de IKEF; ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna monunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether; S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König.  
Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:

Ce s-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8,  
D-7580 Bühl 16, FR Germanio

Financa sidejo kaj membro-administrado:

Ce s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97,  
B-8000 Brugge, Belgio

Redaktora sidejo:

Ce s-ro Daniel König, Schwarzwaldstraße 47  
D-6800 Mannheim 1, FR Germanio; telefono: +49.(0)621.821710

La jara membrokotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ciuj, kiuj intencas *kunlabori/subteni* la klopodojn apliki Esperanto en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

Kontoj: Ce UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c, aŭ ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

Perantoj:

Francio: S-ro François-Xavier Gilbert, Vert Coteau, Longeville en Barrois, F-55000 Bar le Duc, (CCP 1275-89 L Nancy)

FR Germanio: S-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István Gether, Varsányi Irén út. 8, H-1027 Budapest

Italio: D-ro Marco Picasso, via de Gasperi 7, I-20057 Veduggio al Lambro

Japanio: S-ro Seikō Yamasaki, 185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĉirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)

Jugoslavio: S-ro Sotir Taleski, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje

Svislando: S-ro André Piérard, Chemin des Voirambeys, CH-3974 Mollens, (Poŝtĉekkonto, n-ro 19-33545-3)

Togolando: S-ro Gbeglo Koffi, B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

Saluton

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,  
karaj gelegantoj,

en propra afero al mi hodiaŭ eblas rakonti:

Nia loka junulara Esperanto-Ligo nomiĝas "Esperanto-Junularo Kurpfalz" ("Kurpfalz" signifas regiono ĉirkaŭ la urbo Mannheim). Grupoj kiel niaj kutime varbas kaj perbuŝe kaj per flugfolioj. Do, ankaŭ nia loka grupo disponas propran flugfolion. Ni dissendas ĝin al interesitojn kaj elmetas ĝin diversloke (universitato aŭ urba biblioteko).

"Varbi anoncojn estas ege favora rimedo subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: *finance kaj reputacie.*"

Tiu ĉi paragrafo situas ankaŭ en la ĉia LM sur la dorsa paĝo. Mi sukcesis realigi ĝin kaj varbis kvar kvaronpaĝajn anoncetojn por la aktuala eldono de nia grupa flugfolio. La grandeco de tiu kvarpaĝa informilo kongruas al tiu de LM. Samkiel gazetoj ne vivas de vendoprezoj, sed gajnas ĉefe per varbi anoncojn, tiel ankaŭ la nuna eldono kostis nian junularan grupon preskaŭ nenion. La kromaj efektoj estas:

- Dum miaj klopodoj akiri varbantojn mi parolis kun pluraj respondeculoj en pli malgrandaj vendejoj. La temo estis la varbeblecoj, kaj flanke tiuj renkontoj sciigis ilin, ke Esperanto vivas eĉ antaŭ iliaj pordoj.
- En du de la kvar vendejoj nun nia informilo daŭre estas dismetata.
- Inter ili ankaŭ estas librovendisto. Li nun eĉ disponas Esperanto-librojn.

Malgraŭ la informilo estas simpla faldita papero, mi iel estas iomete fieraj pri la 5000 flugfolioj. Speciale, ke la entreprenoj, kiuj pagis por ĝi, estas ĉiuj ekstermovadaj kaj personaj rilatoj neniel ludis rolon (kiel ofte).

Nun, agrablan legadon deziras

/dk



## Estrarano de IKEF sin prezentas

Dum 1990 via financa konsilanto iĝos 40-jara. Post mezlernejo kaj militservo mi eklaboris ĉe *Bank Brussel Lambert* (la 2a belga banko). Dum la unua parto de mia tiea kariero mi plenumis diversajn funkciojn; dum la lastaj dek jaroj mi respondecis pri dokumentaj kreditoj kaj import-/eksport-financado en la (modesta) filio de tiu banko en Brugge. Per vesperaj kaj skribaj kursoj mi akiris superan (ne universitatan) diplomon pri bankado (specialaĵoj: kreditoj kaj eksterlanda komerco).

Antaŭ kelkaj jaroj, la etoso en la banko ne plu estis eltenebla por mi, kaj mi decidis provi realigi multjaran revon: helpi kaj konsili etajn entreprenojn en iliaj rilatoj kun bankoj kaj eksterlandanoj. Post unujara provperiodo evidentiĝis ke la revo restu revo: mi ja akiris etan, sed ne sufiĉe grandan klientaron.

En aŭgusto 1988 mi estis dungata de *RUCA* (kiu, kun *UFSIA* kaj *VIA*, estas parto de *Universiteit Antwerpen*, kupola instanco). Mia ĉefa tasko estas nunmomente kontrolo de la librotenado. Verŝajne mia restado tie ne daŭros longe, ĉar mi tute ne trovis la internacian etoson, kiun mi esperis trovi.

Mi ankaŭ estas estrarano de Flandra Esperanto-Ligo (FEL), internacie konata pro la Stafeto-libroj kaj la revuo *Monato*.

Ĉar oni ne nur okupu pri profesio kaj Esperanto, mi ankaŭ estas membro de pluraj societoj kiuj pristudas lokajn historion kaj kulturon. Pro tempomanko, mi restas "pasiva" membro: mi legas la revuojn, partoprenas aranĝojn, sed ne estas en iu estraro.

Roland ROTSAERT

## La IKEF-BIBLIOTEKO bezonas librojn

La Sekcio Terminara malhavas por sia laboro ekzistantajn terminarojn kaj faklibrojn nacilingvajn pri la temoj: ekonomio kaj komerco.

Se vi posedas tiajn librojn, kiujn vi mem ne plu uzas, bonvolu donaci ilin al la biblioteko de la IKEF, precipe por la laboroj en la Sekcio Terminara kaj ankaŭ en la Redakcio de "La Merkato".



Ni serĉas ĉiujn librojn pri ekonomiaj kaj komercaj temoj: faklibrojn, vortarojn, terminarojn, en la sekvaj lingvoj: germana, franca, angla, itala, hispana, nederlanda kaj rusa.

Tio estas la lingvoj kiujn scias la kunlaborantoj de la Redakcio kaj de la Sekcio Terminara.

Ankaŭ jam eldonitaj Esperanto-faklibroj kaj terminaroj, ne nur pri la temoj "ekonomio kaj komerco", do, pri aliaj fakoj, estas interesaj por ni.

Se vi volus aĉeti speciale bezonatan libron por la IKEF-Biblioteko, ni petas vin redemandi nin indikante la sumon kiun vi povas elspezi por la aĉeto. Ni poste sendus al vi koncernan eltiron el la bezonaĵa listo.

Bonvolu sendi viajn donacolibrojn al la IKEF-Biblioteko, zorge de sinjoro Hans Wiersch, Tilsita Strato 39, D-7063 Welzheim.

Koran dankon anticipe.

-/hw



Leksikono pri Publikaj Rilatoj

En novembro 1989 aperis germanlingva "Lexikon der Public Relations". 90 aŭtoroj verkis ĉirkaŭ 130 artikolojn pri temoj de la Publikaj Rilatoj. Inter ili estas ankaŭ la kunordiganto de la Sekcio Terminara de la IKEF kun la titolo "Public Relations-Sprache Esperanto". Krome lia filino Kerstin Wiersch kunmetis kvarlingvan glosaron pri la artikolaj titoloj, nome: germana, angla, franca kaj ... Esperanto. Koran dankon al la IKEFanoj F.X. Gilbert kaj R. Rotsaert kiuj tralegis la glosaron kaj faris proponojn.

Ni sukcesis enŝovi Esperanton en libron, kiu servos en la ekonomio, precipe en la kampo de Publikaj Rilatoj. La aktuala PR-leksikono estas ideala por ĉiuj PR-fakuloj, gekunlaborantoj de PR-agentejoj, reklamoficejoj, studentoj en altlernejoj, fakaltlernejoj, reklamfakaj akademioj, akademioj pri administrado kaj ekonomio, gekunlaborantoj en la PR-, publikecaj k. gazetaraj sektoroj, en eldonejoj kaj elektronikaj komunikiloj.

Do, ni varbas por Esperanto en tiu rondo kaj ni devas daurigi tiajn klopodojn ĉie kie tia estas ebla.

La kuneditoro de la leksikono, Profesoro Doktoro W. Pieper, raportis ke la libro estis publike prezentita komence de novembro 1989 al gefakuloj de ekonomio, komerco kaj bankoj en Baden-Baden/Germanujo.

Kiam li atentigis la auskultantaron al la glosaro kun Esperanto oni interesiĝis pri la kialo. Profesoro Pieper montris al la artikolo "Public-Relations-Sprache Esperanto" kaj rekomendis la IKEFon kun ĝiaj celoj. Evidente Esperanto faris grandan impreson sur la ĉeestintoj.

La eldonejo "verlag moderne industrie", D-8910 Landsberg, permesis traduki kaj aperigi la artikolon en Esperanto.

-/hw

La difino

Esperanto estas lingvo planizita. El inter multe da lingvoj artefaritaj Esperanto dum pli ol cent jaroj de ekzistado akiris ĝeneralan akcepton kaj pruvis vivoforton. Ĝi ne plu estas la arta au la helpa lingvo, ĝi fariĝis intertempe plenvalora kaj vivanta.

Ĉirkaŭ okdek procentoj da vortaj radikoj devenas de romanaj lingvoj. Sagace elpensita sistemo de pre- kaj sufiksoj permesas tujan vortfaradon. La gramatiko havas nur dek ses regulojn. Esperanto estas pli facile lernebla ol iu alia lingvo. Pro siaj logika strukturo kaj reguleco, ĝi estas almenaŭ egalranga al la esprimovo kaj elasteco de etnaj lingvoj, eĉ parte supera al ili.

Esperanto ne forŝovos iun ajn nacian lingvon. La Lingvo Internacia estus la dua lingvo, punta lingvo. Per ĝi ĉiu parolanto iom venas renkonte al la alia. Respektante la plenan lingvan egalrajtecon Esperanto ebligas rektan renkontiĝon de la homoj.

Esperanto, la instrumento por Publikaj Rilatoj

La aplikadaj ebleco kaj neceso de la Publikaj Rilatoj okazas sekve de diversaj komponantoj, interalie de merkataj instrumentoj. Unu el ili estas la grupo de la komunikiloj. Sed kio estas ili sen lingvo? Ĝi ĉiam partoprenas en tiu rondo, kvankam unu difinita etna lingvo nur kapablas atingi limigitan aron publikan. Tiamaniere oni alparolas germane nur ĉirkaŭ 120 milionoj da homoj, se ni kunmetas la partojn de gepatra kaj de dua lingvoj. Por tiuj kiuj parolas france, jen ĉirkaŭ 280 milionoj da geparolantoj en la tuta mondo. De tiaj komparoj oni povas fari multe rilate aliajn etnajn kaj naciajn lingvojn.

Do, la Publikaj Rilatoj devus uzi du au pliajn etnajn lingvojn por atingi tiujn grupojn. Kiel tute alie efikus la aplikado de Esperanto, se ĝi estus internacia, dua lingvo krom la etnaj! Oni devus apliki nur centran, neutralan komunikilon: Esperanto.



Ankorau necesa estas la apogo ĉefe flanke de la politikistoj kaj de la tutmondaj ŝtatoj, kaj la enkonduko de la Esperanto-instruado en lernejoj. Esperanto pruveble havas propedeutikan valoron: Tiu kiu lernas unue Esperanton, povas pli facile akiri la konojn de aliaj fremdlingvoj.

#### Esperanto kaj Publikaj Rilatoj por Ŝtatoj

En la kadro de la subteno de rilatoj inter la ŝtato kaj la publiko, ne nur en la propra lando, Ĉina Esperanto-Ligo en Pekino ĉiumonate eldonas sepdek-paĝan revuon kiu montras pli ol 20 % da koloraj fotoj (El Popola Ĉinio). Tiu magazino informas pri la lando kaj la loĝantaro, pri la historio, pri la scienco ktp. de la Popola Respubliko Ĉinio. Ĝi unue alvenas ĉe Esperanto-parolantoj tutmondaj. Ĉiu ricevinto havas la permeson - oni eĉ rekomendas ĝin - pludoni eltirojn kaj tradukojn indikante la fonton. Per tiu maniero rimarkinda estiĝas publikaj rilatoj favore al ŝtato kun helpo de la Lingvo Internacia; Esperanto. Per tio oni atingas celgrupojn per interesaj kaj multflankaj sciigoj.

#### Esperanto kaj la Publikaj Rilatoj por ekonomio kaj komerco

Por plenumi Publikajn Rilatojn precipe en la tre grava kampo de ekonomio kaj komerco fondiĝis 1984 fakgrupo en la Esperanto movado;

IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo).

Tiu fakgrupo havas la celon plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter personoj kaj firmaoj en la komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco pere de Esperanto.

Oni atribuas grandan signifon al la perfektigo de la vorttrezoro en plurlingvaj terminaroj. En fakgazetoj aperas Esperante anoncoj de ofertantaj firmaoj. Dum seminarioj, kongresoj kaj foiroj oni tutmonde helpas al Publikaj Rilatoj por Esperanto, la Lingvo Internacia. La centran sidejon de la fakgrupo oni ekscias en Germanujo ĉe la Germana Esperanto-Ligo, Lambertstrato, D-6430 Bad Hersfeld, kaj en aliaj landoj ĉe la kompetentaj ligoj.

#### Esperanto, la dua lingvo por Europo

Post rigardado de la sekvantaj sinoptikaĵoj estas evidente ke la Publikaj Rilatoj de nur unu Europa ŝtato devas multe elspezi por alparoli en ĝia nacia lingvo la loĝantaron de la aliaj landoj de la komunumo. Do, Esperanto estas aplikebla ankau kiel ponto dum agadoj de Publikaj Rilatoj, tio estas ke la internacia kompreniĝo okazas inter la diversaj landoj kun helpo de la komuna lingvo: Esperanto. Krome la enhava koncentriĝo de Esperanto proksimiĝas al la bezono de la Publikaj Rilatoj. Nome, internacie orientiĝantaj Publikaj Rilatoj devas uzi koncizajn kaj kompreneblajn esprimmanierojn. Aliaflanke la ricevantoj de Publikaj-Rilatoj-informoj estos superŝargitaj per multe da komunikilaj formoj.

Sekve de tio plialandaj agadoj havos malmulte da akceptemo. La komuna pontlingvo ne lasis estiĝi ksenofobion nek pro la amplekso nek pro la emocio kontraŭ ĉio fremda. Finfine oni devas turni la atenton al tio ke Esperanto kiel artefarita lingvo povas esti akceptita per la komputoro pli rapide kaj pli facile, ĉar ĝia regularo estas transmetita sen komplikajoj. Anstataŭ traduki el ĉiu EK-lingvo en ĉiun alian per unuopa lingva sistemo (bildo A), Esperanto kiel pontlingvo servas al ĉiu traduko (bildo B).



#### Fontindikoj:

- Klag, W.: Die Plansprache Esperanto und ihr propädeutischer Wert. In: Die Österreichische Höhere Schule, Heft 1, Jg. 38, Wien 1986. (La lingvo planizita Esperanto kaj ĝia valoro propedeutika)
- Schubert, K: Esperanto und der Übersetzungskomputer. In: Esperanto - ein Jahrhundertwerk -, herausgegeben vom Deutschen Esperanto-Bund, Bad Hersfeld 1987. (Esperanto kaj la traduka komputoro)

Hans Wiersch



Publikaj-Rilatoj-Komunikilo Esperanto



**COVALEX S.A.**

CHEMIN DES VOIRAMBEYS

CH - 3974 MOLLENS

(SVISLANDO)

... JAM DE LONGE KONAS  
 LA FABRIKANTOJN DE LA ALTKVALITAJ PRODUKTOJ  
 KIUJ NUR EN SVISLANDO EKZISTAS  
 KAJ KIUJN VI NE ANKORAŬ TROVIS

...AŬ ELEKTRONIKAJ EROJ

...AŬ VINOJ

...AŬ ŜIPOJ

...AŬ BANKAJ SERVOJ

...AŬ ...???...ĈU NE ?

PROFESIE - FIDINDE - DISKRETE

ELDONAS KOMPUTERPROGRAMOJN (IBM AŬ KONGRUAJN)  
 ŜANĜAS, ADAPTAS ELEKTRONIKAJN INFORMOJN EL UNU  
 AL ALIAN SISTEMON (DISKOJ - DISKETOJ 8" + 5" + 3")

TELEFONO +-41-27 / 41 62 45

TELEFAKSO +-41-27 / 41 90 65 ("FAX")

## *Sanco por Feliĉo*

Se pezas la vivo sur viaj ŝultroj; se vespere, vi volas kviete ripozi kaj iomete pripensi vian situacion; se vi serĉas ŝancon por esti feliĉa eĉ dum malfacila vivo, la plej sukcesa libro de Phil Bosmans, tradukita jam en 14 lingvojn kaj eldonita en 3 500 000 ekzempleroj, helpas vin.

96 paĝoj. Broŝurita. Prezo: 395 BEC + afranko. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



---

**Bonvenon al niaj novaliĝintoj!**

S-ro Peter Berx, (IKEF 93), Klein Klosterstraat 17,  
B-3820 Alken, Belgio

S-ro Brendan Marron, (IKEF 94), 76 Corrib Avenue,  
Belfast, BT11 9JD, Britio

GALENIKA - Dr. Sci. Mika J. Andric, (IKEF 95),  
Batajniki put b.b., YU-11080 Beograd, Jugoslavio

S-ro Denis Flochon, (IKEF 96), 1, rue de la Giraudière,  
F-69530 Brignais, Francio

S-ro Henry Ordoñez Potes, (IKEF 97), Apartado Aereo 51864,  
Bogotá 2 (Chapinero), Colombia

S-ro Stojan Pavunčev, (IKEF 98), str. H. Tošin 18,  
BG-3000 Vraca, Bulgario

---

**IKEF-ano transloĝiĝis: (denove)**

S-ro John C. Rapley, (IKEF 6), Rochussenstraat 135D  
NL-3015 EJ Rotterdam, Nederlando

---

Nome de IKEF dankas la prezidanto al IKEF-ano s-ro Johann Pachter pro lia favora donaco de la libro "Russische Handelskorrespondenz für Deutschsprechende"; kaj al s-ro Wiersch, kiu donacis la libron "Englisch für Kaufleute" al la biblioteko de IKEF.

S-ro Wiersch raportis, ke li jam povis uzi la libron pri rusa korespondado por sia terminologia laboro.

---

En Hainan, Ĉinio, foondiĝis nova Esperanto-Asocio, la Yema (Hainan) Grupo. La celo de tiu grupo estas interalie komerci. Plurajn informojn riceveblas ĉe:

S-ro XIAO FUJUN, F-ino ZHANG YUAN

No. 13, Longhua Erheng Lu, Haikou, Hainan SER., P. R. Ĉinio

---

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo en tute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

---

La rajtoj de represado estas malferma, antaŭkondiĉe, ke la fonto estas klare indikota. Pruvekmembroj estas petataj.

---

**Reklamtarifoj**, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

---

Varbi anoncojn estas ege favora rimedo subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: *finance kaj reputacie.* /dk

---